TEVA dum Monda Vegetarana Kongreso

de Heidi GOES (Belgio)

Antaŭ du jaroj tri estraranoj de TEVA partoprenis la Mondan Vegetaranan Kongreson en Dresdeno, Germanio. Vi povis pri tio legi en nia organo (EV2008). Ĉi tiu kongreso okazas ĉiun duan jaron kaj ĉi-jare ĝi okazis en Azio, pli specife en Ĝakarto, la ĉefurbo de Indonezio, sur la insulo Javo.



Jennifer BISHOP (maldekstre) kaj Ilia Sumilfia Sondang DEWI ĉe la budo de TEVA. Ili parolas pri Esperanto al du kongresanoj.

La indoneziaj vegetarana kaj novfondita vegana societoj bone organizis la kongreson kaj ankaŭ faris por ĝi multe da reklamoj. Mi ekzemple en plej multaj vegetaraj restoraci(et)oj, ankaŭ post la kongreso, trafis la afiŝon de la kongreso. Ĝenerale dum la kongreso estis multaj prelegoj (dulingvaj kaj unulingvaj – en la indonezia kaj/aŭ la angla) kaj foiro kun multaj budoj kun pretaj manĝoj, kun vegetaraj varoj kaj kun informoj. Ankaŭ TEVA havis budon, kiu estis multe vizitata. Ĉe ĝi deĵoris dum la kongreso entute kvin esperantistoj: Jennifer kaj Alan BISHOP el Aŭstralio, Ilia Sumilfia Sondang DEWI kaj Acy ROESMAYANTI – du indoneziaj e-istinoj – kaj mi mem, sekretario de TEVA.

En vendredo, la unua de oktobro, la unua tago de la kongreso, jam estis foiro, sed ankoraŭ ne prelegoj. Estis nur la (iom tro) longa malferma ceremonio, kun multaj paroladoj (kun bedaŭrinde fuŝaj tradukoj...) kaj fine iom da muziko kaj kantoj, kaj, kiel en la Azia Vegetarana Kongreso, belaj grupdancoj.

Parolis ekzemple iu de la ministerio pri sano, la guberniestro, la posedantino de la granda kongresejo (kiu jam estas vegetaranino laŭdire de pli ol duonjarcento), ...
Dum la semajnfino multaj homoj vizitis la kongreson, kaj vizitis la budon eĉ maljuna indoneziano, kiu ankoraŭ memoris ke li iam lernis E-on dum kelkaj monatoj kiam li estis juna. Tio ege ĝojigis min, ĉar ĝi estas plia pruvo ke la movado en la 1950aj jaroj vere estis vigla.

Surfote (de dekstre): Ilia, Acy kaj Heidi ĉe la budo de TEVA dum la Monda Vegetarana Kongreso.